

Partoprenu en nia konkurso

Rubriko por infanoj

INTERKULTURO



INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI

JUNIO 1999

N-ro 2 (89)

Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1237 vort'radikojn. Tiu ĉi vort-ar'eto: *Esperanto, Minimum szótár* aperis en 1995, kaj estas aĉet-ebla ĉe la libro-servo de UEA kaj HEA.

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko(-) troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin-ajo: bild'karto, verd'igi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto re-venas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino ...) ni ne uzas kromsignojn.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo



Sur la titol'paĝo:
Foto de Saliko
(Finlando)

Partopren'antoj
de la Internacia
Infan-Kongres'eto
1998

El-koran saluton al ILEI

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kiu ĉi-jare jubileas¹ sian 50-jar'iĝon.

Sen-dube ILEI estas la plej grava faka organiz'ajo de UEA (Universala Esperanto-Asocio) ne nur pro sia relative² granda membr'aro, sed precipe pro la signifo de la instruist'aro en la Esperanto-movado, kies grava celo estas: dis-vast'igi Esperanton tra la mondo. Kiuj, se ne ili, povas plej efike kontribui al la real'ig'ado³ de tiu celo? Kaj krome, laŭ-profesie⁴ ili aktivas inter la jun'ul'aro, kiu estas por ni aparte grava.

Nia revuo dankas sian ekziston al ILEI, kiu estas el-don'anto de Juna Amiko. Sen la financa⁵ helpo de ILEI nia internacia period'ajo⁶ jam de-longe dormus eternan dormon. Ĝia helpo estas des pli grava, ke ni scias, ILEI mem havas multajn zorgojn, tamen, konsci'ante pri la grav'eco de tia revuo, ĉiam sub-tenas nin.

Okaze de la jubileo ni deziras brilajn sukcesojn al la estr'aro kaj al ĉiuj membroj tra la tuta mondo. Akceptu kun varma koro la ĉi-apudajn vortojn de ĝia prezid'anto, s-ro Mauro La Torre.

Geza Kurucz
redaktoro

1. havas rond'ciferan dat're-venon / 2. kompare al la ceteraj / 3. reala: vera, ne-imag'ita / 4. profesio: labor'okupo / 5. mona / 6. gazeto.

La kvazaŭa lernejo Tibor Sekelj

Jam pli ol 30 klasoj el ĉiuj kontinentoj (ekde Lapon'ujo ĝis Patagonio, tra Ganao, Uzbek'ujo, kaj Kostariko) an'ĝis en INTER-KULTURO kaj formas kvazaŭ unu lernejon.

Tiu multkultura kvazaŭ-lernejo prenis sian nomon de *Tibor SEKELJ*, granda moderna vojaĝ'isto, verk'isto kaj geograflisto.

Kion celas la instruistoj, kiuj kun-laboras por plani kaj konstrui tian strangan miks'ajon de divers'koloraj lernantoj? Antikva proverbo asertas ke "la mondo belas, ĉar ĝi estas varia". Ni eduk'istoj opinias, ke ĉiuj regionaj kulturoj, "grandaj" kaj "malgrandaj", proksimaj kaj malproksimaj, entenas valorojn, kiuj estas kon'indaj, kaj ĉiu el ili riĉ'igas la tut'hom'aran kulturon. **Ni eduku al respekto kaj kompreno de "fremdaj" kulturoj.**

Kiel funkcias konkrete la kvazaŭa lernejo *T. Sekelj*? Al la klasoj, kiuj partoprenas Interkulturon, oni proponas esplor'indajn temojn (kiel nutrado, vest'ado, komunik'ado, lingvoj, lerneja vivo, tradicioj, muziko, ktp.). Ekzemple, baz'lernejaj klasoj de 10-jar'uloj povas al-fronti la nutradan tem'aron per interŝanĝo de informoj pri siaj ĉiu-tagaj manĝo-kutimoj, en la lernejo kaj hejme, pri la deveno de siaj manĝaĵoj. Poste oni devas kompari, analizi, pri-diskuti, la kolekt'itajn informojn kaj prezenti ilin en la ekspozici'ejo de la kvazaŭa lernejo.

Kiam eblas, la infanoj interŝanĝu **materiajn objektojn**. Se la klasoj interŝanĝas prefer'atajn infan'gazetojn kaj bild'libr'etojn, la ricev'antoj povas "legi" en tiuj "dokumentoj" pri la ecoj de la koncernaj kulturoj, civilizoj kaj medioj. Kompreneble ankaŭ desegn'ajoj kaj fotoj povas bone dokumenti la kutimojn kaj la natur'ajojn. Pensu ekzemple pri fotoj pri la lernejoj, lerno-klasoj, loĝ'ejoj, vilaĝaj placoj, send'itaj de partneraj klasoj; aŭ pri son'bendoj kun kant'ajoj, proverboj kaj similaj.

Kian rolon havu la **Internacia Lingvo** en la kvazaŭa lernejo? Mem-kompren'eble ĝi estos la prefer'ata labor'lingvo, kiun la klasoj sam'tempe lernos, por komuniki kun ali'landaj klasoj. Ni emfazu, ke en Interkulturo Esperanto **ne estas la celo sed la ilo.**

Do, resume, ĉiu klaso kontaktas sam'nivelajn klasojn kaj kun ili inter-konsentas esplor'temon (ekzemple la ĉiutaga lerneja vivo, lernejoj premioj kaj punoj, lernejoj tra-viv'ajoj, ...), kolektas kaj interŝanĝas dokument'ajojn, pri-laboras la ricev'ajojn kaj prezentas la agadon per eta publika ekspoziciaĵo. Tia labor'ciklo povas daŭri unu aŭ du sezonojn.

Jnterkulturo estas iniciat'ita kaj kun-ordig'ata de ILEI, kaj ĝi okazos sub la aŭspicio de Unesko.

Maŭro LA TORRE <m.latorre@uniroma3.it>

*Pri la agado de Interkulturaj klasoj Juna Amiko nepre raportos.
Ni atendas viajn leterojn kaj fotojn aŭ desegnaĵojn.*

En la sekvaj numeroj ni publik'igos serion da bildoj el nia literatura heredaĵo el la plumo de nia kun-laboranto, el-stara islanda poeto³, Baldur RAGNARSSON. Konsciuj, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

1

Esperanto nask'iĝis kiel skriba lingvo. Dum pli ol cent jaroj, esperantistoj dise, tra la mondo, uz'adis la lingvon en korespondado, en revuoj, en libroj. Ankoraŭ hodiaŭ ĝia ĉefa uzo estas skriba, lasta-tempe per nova tekniko, elektronika poŝto, en kreskanta grado. Tamen, jam en la komenco, oni uzis la lingvon ankaŭ en parolo. Laŭ-dire la unua konversacio⁴ en Esperanto okazis inter ĝia aŭtoro⁵, *d-ro ZAMENHOF* kaj lia sam'urb'ano *Anton GRABOWSKI* jam en 1887. Poste, ankaŭ la parola uzo de la lingvo ludis ĉiam pli gravan rolon.

2

Kiel literatura lingvo Esperanto havas siajn radikojn en la kultura tradicio⁶ de la latin'idaj⁷, ĝermanaj⁷ kaj slavaj⁷ lingvoj. Do, kiel atend'eble, la originala⁸ literaturo de Esperanto estis kaj daŭre estas sub forta influo⁹ de tiu tra-

dicio. Granda pli-multo de esperantistaj verk'istoj estas eŭropaj

BILDOL EL LA HISTORIO

aŭ parol'antaj eŭrop'de-venajn lingvojn. En *Esperanta Antologio¹⁰*, ekzemple, granda kolekto de poemoj, originale verk'itaj en Esperanto (2-a el-dono 1984) 163 poetoj estas prezent'ataj, el kiuj nur 9 estas japanaj kaj 2 ĉinaj. Tamen, la ekster-eŭropaj influoj en la Esperanta literaturo kreskis en la lastaj jar'dekoj. La Esperanta literaturo ne-halt'ig'eble progresas al universal'eco¹¹

3

La unua grava verkisto en Esperanto estis *ZAMENHOF* mem, la aŭtoro de la lingvo. Liaj kongresaj parol'adoj kaj eseoj¹²

L. L. Zamenhof



boloj¹⁷. El tiuj poemoj *La Vojo* el-staras kiel metafora esprimado; la titolo mem estas metaforo, signifanta la kuraĝan ir'adon de la esperantistoj al la celo, t.e.¹⁸ la fina venko aŭ akcepto de Esperanto kiel internacia komunikilo kaj pac'ig'ilo de la hom'aro. La poeto klare konscias la malfacil'aĵojn, kiuj atendas la labo-

LITERATURO DE LA ESPERANTA

estas majstro-verkoj de klara stilo kaj profunda en-havo. Ili nepre meritas zorgan stud'adon de ĉiu serioza esperantisto. Zamenhof aper'igis ankaŭ kelkajn poemojn¹³. Inter tiuj *La Espero* estas la plej kon'ata, ĉar tradicie ĝi far'igis ia oficiala¹⁴ himno¹⁵ esperantista laŭ la muziko de *F. de MÉNIL*. Tiu poemo kun kvar aliaj: *La Vojo*, *Al la Fratoj*, *Preĝo sub la verda standardo* kaj *Al la "Esperantisto"*, havas ĉiuj universalan karakteron en tiu senco, ke tie Zamenhof al-parolas ĝenerale la internacian esperantistaron en simplaj, universale kompren'eblaj metaforoj¹⁶ kaj sim-

ron de la esperantistoj, necesas ne flank'iĝi de la cel'ita vojo, malgraŭ malrapida progreso, ĉar "*eĉ guto malgranda, konstante frapante, / tra-boras la monton granitan*"¹⁹". Li komparas la voj'ir'antojn al sem'antoj, kiuj ne lac'iĝas, kvankam "*cent semoj perd'iĝas, mil semoj perdiĝas*". Se "*longa sek'eco aŭ ventoj subitaj*" de-ŝiras "*velk'antajn*"²⁰ foliojn" la semantaj vojaĝ'antoj rigardu tion kiel re-pur'igon, kiu donas pli freŝan forton. La poemo havas ja romantikan²¹ karakteron, sed ankaŭ instigan²² forton, kiu ankoraŭ nun havas sian validon.

Baldur RAGNARSSON, Islando

PIED'NOTOJ
de p. 4-5

1. post-las'ajo de antaŭ-ulo(j) / 2. arto de lingvo / 3. verkisto de versaj verkoj / 4. in-ter-parol'ado / 5. kre'into de iu art'verko / 6. hered'ita distinga propr'ajo de iu hom'grupo / 7. apartenantaj al diversaj, sed samde-venaj lingvo-branĉoj / 8. ne traduk'ita / 9. efiko / 10. kolekt'ajo el plej bonaj verkoj / 11. tut'mond-eco / 12. mal-longaj verkoj, kiuj pri-ekzamenas iun temon / 13. versajoj / 14. akcept'ita de supera organiz'ajo / 15. festa nacia poemo muzik'ig'ita / 16. *piedo* de monto, ekzemple, estas metaforo / 17. la verda koloro, ekzemple, estas simbolo de espero / 18. = tio estas / 19. granito: mal-mol'ega roko / 20. velki: perdi sukon, akvon; mort'onta / 21. romantiko: literatura stilo plena de fortaj sentoj / 22. aktivigan, ag'igan.

Piedo BRAZILA LERNEJO


Kiam la infanoj estas du-, tri- aŭ kvar-jaraj, ili povas ekviziti infan'ĝardenon aŭ specialajn kursojn (antaŭ-lernejon). Tie ili ludas, kantas, faras man'laborojn, ek-lernas la literojn, la numeralojn (1, 2, 3... 8, 9) kaj foli'umas ilustr'itajn¹ librojn por koni simplajn (geometriajn²) formojn kaj kelkajn objektojn.

La dev'iga instru'ado por la infano komenc'iĝas, kiam ĝi havas **7 jarojn**. Tiam ĝi ek-lernas en la unua klaso de la Unua-grada Lernejo. La infanoj studas, precipe, la portugalan lingvon (oficiala³ lingvo de Brazilo) kaj matematikon. La **lerno-jaro** ĉiam komenciĝas en aŭtuno, tio estas en **februaro** kaj daŭras ĝis **decembro**, poste, ĝis la nova lerno-jaro la geknaboj havas somerajn feriojn (decembro, januaro). En la 4-a klaso la geknaboj ek-studas geografion⁴ kaj historion kaj en kelkaj specialaj lernejoj religion kaj la anglan lingvon. La lecionoj daŭras po **45** minutojn.

En la **superaj klasoj** de la Unuagradaj Lernejoj, de la 5-a ĝis la 8-a klasoj, la geknaboj studas, krom la supre menciitajn studobjektojn, religion kaj sciencojn, ili havas lecionojn por desegni kaj sporti. En kelkaj specialaj lernejoj ili okup'iĝas ankaŭ pri informadiko kaj laboratoriaj teknikoj. Ek-de la 5-a klaso fremda lingvo estas deviga. La angla estas parto de la instru'programo de preskaŭ ĉiuj lernejoj, nur tre malmultaj studas la francan aŭ la hispanan. Pro gravaj komercaj rilatoj de Brazilo kun siaj najbaraj landoj (Argentino, Urugvajo...), ek-de 2000 la hispana estos deviga objekto en Brazilo, tamen pro manko de sufiĉaj fakinstruistoj nur en la sudaj brazilaj ŝtatoj oni povos enkonduki la novan sistemon. Antaŭe, la latina aŭ la franca estis la fremdaj lingvoj de niaj infanoj kaj plen'kreskuloj. Nuntempe, preskaŭ neniu studas ilin.

La **Dua-grada Lernejo** havas 3 jarojn. En ĝi oni instruas tiujn studobjektojn, kiujn en la Unuagradaj Lernejoj, sed anstataŭ la 'sciencoj' ili lernas aparte la scienco-branĉojn, nome biologion, fizikon, kemion. Ekde ĉi tiu jaro (1999) la lernantoj de la Duagradaj Lernejoj povas libere elekti la kvaronon de la studobjektoj. Teknikaj kursoj estas preferataj, ĉar la geknaboj deziras pli bone prepari sin al la venonta profesio⁵, al la moderna⁶ socio reg'ata de komput'iloj.

Ĉe pri-juĝ'ado de la kapabloj, scioj la instruistoj uzas takso-ciferojn de 0 ĝis 10 (la plej bona noto). Tamen, en kelkaj lernejoj la ekzamenoj, kiujn oni okaz'igas ĉiun duan monaton, estas takst'ataj per literoj: A (la plej bona), B, C, D, E.



ROLLUDO: Kion ludi?

Instrukcioj por Miko Lonel

Proponu ludi kune soldatojn. Por via nask'ig'tago vi ricevis kaj kunportis novan kolekton da belaj soldatoj. Vi havas, plie, modelajn atak'aviad'ilojn, tankojn, ŝipojn.

“Kial Amoro kun-portas pafarkon?”

“Nu, imagu, kiel aspektus la ĉarma, flug'il-hava knab'eto kun siaj bukloj kaj maŝin'pafilo sub la brako!”

La studojn oni povas daŭrigi en superaj lernejoj: alt'lernejoj kaj **universitatoj**⁷. La studo-daŭro varias⁸ de 4 ĝis 6 jaroj. Ekzemple, belliteraturo, geologio⁹ kaj medicino¹⁰ daŭras respektive 4, 5 kaj 6 jarojn. Krom la klasikajn¹¹ kaj modernajn lingvojn eŭropajn, en la ĉefaj universitatoj oni povas studi la araban, ĉinan kaj aliajn lingvojn.

En Brazilo vivas **pli ol 200 etnoj**¹², kiuj havas specialajn lernejojn kun la instruado precipe de la gepatra, indiĝena¹³ lingvo. Tamen, la portugala por ĉiuj lernantoj estas deviga por kontakti¹⁴ kun la aliaj brazil'anoj.

Pekim Tenorio VAZ, Brazilo

1. bild'ig'itajn teksto-partojn / 2. parto de matematiko, kiu okup'ig'as pri tri-kaj kvar-anguloj, rondoj kaj aliaj formoj / 3. ŝtate re-kon'ita / 4. scienco-branĉo kiu pri-skribas la Teron, la viv'manierojn, veterojn / 5. viv'okupo / 6. nun-tempa, ne eks-moda / 7. supera lernejo, kutime, pli valora ol alt'lernejo / 8. ĉiam estas inter certaj limoj / 9. scienco pri la konsisto de la tero / 10. scienco pri la homa korpo kaj la kurac'ado / 11. malnovajn alt'valorajn / 12. sam'de-vena popol'grupo / 13. indiĝeno: pra-loĝ'anto / 14. fari inter-ligon.

Tiam juna viro havis la ideon helpi al infanoj troviĝ'antaj, post la milito, en mizera stato. Li volis, ke infanoj sen gepatroj kaj parencoj trovu novan hejmon en tiel-nom'ata SOS¹-Infan'vilaĝo. Tiu ĉi juna viro estis **Hermann GMEINER** el Aŭstrio kaj la unuan SOS-Infanvilaĝon li konstruis en *Imst*, Aŭstrio.

Jam post mallonga tempo, la homoj vidis kaj

INFAN VILAĜO

Tut'mond'igo de la ideo

En la jaro 1963 **Hermann GMEINER** estis en Suda Koreio. Tie li renkontis la 12-jaran knabon **Kim Chung Suk**. Li estis unu el miloj da infanoj, kiuj en tiu tempo vivis solaj, sen

Valoraj riz'eroj

Li diris al **Kim**, ke li re-venu kun man'pleno da rizo. Li volis kun-preni la rizon al Eŭropo kaj

sentis, ke la bedaŭr'indaj infanoj bone fartas en tiu familia medio² kaj povas kolekti novan forton por sia plua vivo. La sukceso entuziasm'igis milojn da homoj. Unue en Aŭstrio kaj Germanio, poste en la tuta Eŭropo.



gepatroj sur la strato. **Kim Chung Suk** almoz'petis³ ĉe sinjoro **Gmeiner**. Sed tiu volis, por la infanoj en Suda Koreio, fari pli ol sat'igi nur tiun ĉi knabon.

vendi unu-opajn riz'erojn po unu dolaro⁴. Per la mono li intencis konstrui SOS-Infanvilaĝon en

Suda Koreio. *Kim* revenis kun tuta manpleno da rizo — kaj ne nur li. Pli kaj pli da amikoj de la malgranda knabo venis kun rizeroj kaj baldaŭ estis plen'ig'ita granda sako kun cent-miloj da rizeroj. *Hermann Gmeiner* kunprenis la rizerojn

La bazaj principoj⁵ ĉiam ankoraŭ valoras

Kvar simplaj principoj — patrino, gefratoj, domo, vilaĝo — laŭ kiuj la infanoj vivas en la tuta mondo sukcese, sen-depende de kulturo, haŭt'koloro aŭ religio, estas la sekreto de la sukceso de la laboro por la SOS-Infanvilaĝoj en la tuta mondo.

al Eŭropo, dissend'adis la rizerojn unu post la alia kaj esperis la help'emon de la homoj. La sukceso estis grandega. La nombro de homoj, kiuj entuziasm'ig'is pri la ideo de SOS-Infanvilaĝoj, kreskis de tago al tago.

Hodiaŭ en 128 landoj ekzistas, en-tute, 371 SOS-Infanvilaĝoj en ĉiuj kvin kontinentoj⁶.

Multan bonon oni jam atingis!

Sed: multaj infanoj ankoraŭ etendas siajn manojn al ni kaj bezonas pluan helpon!

Dieter BERNDT

1. SOS - signalo por voki helpon / 2. ĉio, kio nin ĉirkaŭas / 3. el-peti donacon / 4. mono en Usono / 5. ĝeneralaj reguloj / 6. mondo-partoj.

**SEN-PAGA JAR'ABONO AL
juna amiko**
por la jaro 2000
per partopreno en la
**POENTO'KOLEKTA
KONKURSO**
(Vidu la paĝojn 16-17.)

**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**
estas por ĉiuj, kiuj instruas
Esperanton.
Kvar numeroj jare.
Abonu ĉe via landa ILEI-
sekciestro.

	NLG	DEM	USD	2-4 abonoj	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	24	21	15	-33.3 %	-50 %	en la prezo
Tarifo 2	13	12	8,50	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	9	8	6	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF			po 480 HUF	420 HUF	—



RUBRIKO POR INFANOJ

Redaktas: **Stefan MACGILL**

NI LUDU KUNE!

Adamo kaj Zita estas amikoj. Ili parolas:

Adamo: Saluton, Zita!
Zita: Saluton, Adamo! Per kio ni ludu?
Adamo: Ni ludu per miaj modeloj¹.
Zita: Kie ili estas?
Adamo: En mia tir'kesto. Tie!
Zita: Kie ni ludu?
Adamo: Ni ludu en la salono².
Zita: Kial?
Adamo: Ĉar ekstere estas mal-varme.
Zita: Ĝis kiam vi rajtas ludi?
Adamo: Ĝis la kvina horo.
Zita: Bone, ni ludu!



Aliaj paroj da amikoj parolas. Vi estu la amikoj! La supra dialogo³ estas por vi modelo. Jen informoj, kiuj helpos vin:

Kiuj	Ludu	Kie estas?	Kie ludu?	Kial?	Ĝis kiam?
Brenda kaj Viktoro	per 	Sur la ŝranko en la salono.	En la ĝardeno.	Tie estas sufiĉe da spaco.	
Celino kaj Una		En la laborĉambro de mia paĉjo.	En la laborĉambro.	Ne eblas forporti la maŝinon.	
Ĉarloto kaj Tomaso	Per faruno kaj lakto kaj sukero.	En la fridujo kaj stokejo.	En la kuirejo.	Tie estas akvo kaj ujoj.	Panjo venos kaj trovos nin.
Eva kaj Ŝandoro	kun 	En 	En la parko.	Tie la hundo povas kuri.	
Flora kaj Silvia		En la litĉambro de mia panjo.	En la kelo.	Tie la muziko ne ĝenos iun.	
Greta kaj Rodrigo		Sub mia lito.	En la banukuvo.	Nur tie estas granda akvujo.	

1. malgrand-
ig'itaj objektoj;
imit'indaj
ekzemploj / 2.
granda ĉam-
bro / 3. inter-pa-
rolo / 4. roli:
sur-preni la
formon kaj
karakteron de
alia homo kiel
faras teatr'isto
/ 5. la plej
"saĝa" maŝino
/ 6. detalaj
informoj kiel
agi / 7. senco-
hava aro da
vortoj / 8.
aktoro:
teatr'isto / 9.
kapabla ŝanĝi
pozitive la
opinion de
alia(j) homo(j) /
10. ema inter-
konsenti.



Rolludo⁴

Kion
ludi

Kvar amikoj renkont'iĝas: Elma, Mirjam, Miko kaj Amal. Pluvas kaj ne eblas ludi ekstere. Ili ludos interne. En la lud'ĉambro estas luddomo, tablo, seĝoj kaj komput'ilo⁵. Ili ludos kune dum tri horoj. Sed kion? Ĉiu amiko trovos en la revuo tekston kun instrukcioj⁶.


Dividu vian grupon en kvar sub-grupojn. Ĉiu kvarono legu nur *unu* tasko-tekston kaj diskutu ĝin. El-pensu bonajn frazojn⁷ por la star'punkto de via rol'ulo. Ĉiu grupo elektu rolulon. La kvar roluloj aktoru⁸ la scenon.

Poste, la grupoj elektu aliajn rolulojn kaj provu denove. Post ĉiu rolludo diskutu:

- Kiu rolis plej bone kaj lerte? Kiu estis la plej konvinka⁹?
- Kiuj havis aparte bonajn aŭ amuzajn ideojn?
- Ĉu unu rolulo gajnis; ĉu oni venis al kompromisa¹⁰ solvo?

Amal trovu siajn instrukciojn sur paĝo 17. *Elma* trovu ilin sur paĝo 25. *Mirjam* serĉu ilin sur paĝo 23. *Miko* ricevos siajn instrukciojn sur paĝo 7. Ni proponas du knabinojn kaj du knabojn. *Ŝanĝu*, tamen, laŭ viaj bezonoj. Vi povas elekti aliajn nomojn, se vi preferas proprajn.

	K		
	R		
L	U	D	A
	C		
	E		
	N		
	I		
	G		
	M		
	O		




Horizontale (→):

1. "Rigardu! ___ la ludon sur la ekrano!"
3. "Ni ludu ___ miaj modeloj!"
4. "Ĉu vi certas, ___ ne mankas karto?"
5. Ili ne estas en la suba tîr'kesto, sed en la ___.
8. Ni havas tabl___ojn kaj tabl'egojn.
9. "Mi havas ___ pupojn, kiuj ne estas soldatoj", diras Amal.
11. Tiu elektrona ludo estas mir'inda! Ĝi estas ___ miraklo¹!
14. Unu konkurso estas aŭta, la alia estas ___.
15. Mia pupo² naĝas ĉe la plaĝo³, sed venas granda ___.
16. La pupoj trinku! Estas lakto, suko kaj ___o.
17. Mia pupo ___ sur ĉevalo!
19. Unu kart'aro prezentas familion, la alia ___.
21. Ĉu ne mankas lakto kaj ___o?
22. Mi desegnis mirindan bildon! Mi kreis ___!
23. Mia pupo preferas sukon, ĝi ne ŝatas ___.

Vertikale (↓):

1. Loko, kien pupoj (aŭ infanoj) metas aĵojn, kiujn ili portas.
2. Ĉu ĉesis pluvi? ___ kaj rigardu!
4. "Bone, ni konsentis! Sid'ĝu kaj mi dis-donos la ___!" diras Elma.
6. "Bone, ni konsentis! Sidiĝu kaj mi prenos la ___!" diras Amal.
7. "Bone, ni konsentis! Sidiĝu! Jen miaj ___!" diras Mikko.
8. La vetero estas malbona, do, mi ne povas ludi ___.
10. La infanoj dis-jetas ĉiujn lud'ilojn kaj mal-plen'lgas ĉiujn tîrkestojn. Ili bruas kaj kuras. Ili ludas ___.
12. "Mi estas la plej aĝa! ___ decidos, kion ni ludos!"
13. "Miaj ludiloj estas mir___aj."
18. "Ankaŭ la miaj estas tre bel___."
19. "Miaj batal'antoj ___ la viajn!"
20. "Aŭskultu la belajn ___ojn de mia komputila melodio."

1. apenaŭ kred'ebla afero / 2. lud'ilo homaŭ besto-simila / 3. loko ĉe bordo de lago, maro, rivero, kie oni sun'umas, ludas.



AVO kaj NEPO

El la hispana tradukis:

José de J. CAMPOS PACHECO (Kubo)

Qam vivis surda maljun'ulo, preskaŭ blinda, kiu apenaŭ povis sin teni sur la piedoj. Liaj manoj tremis kaj, manĝante, li el-verŝis la supon sur la tablo-tukon. Lia bo-fil'ino kaj filo estis mal-kontentaj pro tio, kaj decidis en-fermi lin en lian dormo-ĉambron, kaj tie ili donis al li la manĝaĵon en malnova, terakota¹ vazo. La maljunulo mal-ĝoj'igis pro la malamo de sia familio. Kelk'foje li ploris, sed suferis sen plendi.

Qun tagon la vazo falis sur la plankon kaj romp'igis. Tiam

ili aĉetis alian vazon tre malbelan kaj far'itan el ligno.

La geedzoj havis ses-jaran filon. Iun tagon ili vidis lin kavigi pecon da ligno.

“Kion vi faras tie?” demandis la patro.

“Mi faras teleron por panjo kaj vi, kiam vi estos maljunaj.”

La patro kaj la patrino rigardis sin reciproke kaj mal-feliĉ'igis.

Ek-de tiu tago la avo denove manĝis kun sia familio. Ili traktis² lin kun amo kaj respekto, kion meritas ĉiu maljunulo.



1. far'ita el fero-hava argilo (:flava tero, el kiu oni faras vazojn) / 2. kondutis iel kun iu.

Ĉu vi gvidas Esperanto-kurson en lernejo?

Se vi volas firme ligi viajn lernantojn al Esperanto, anigu ilin en INTERKULTURO.

Praktike utiligu Esperanton!

Ĉu vi estas lerneĵ'ano?

Se vi volas util'igi vian lingvo-scion, an'igu kun viaj kurs'amikoj en INTERKULTURO.

Vi kon'at'igos kun la vivo de ali'landaj geknaboj.

Mi legis en popularaj² el-don'ajoj, ke uz'antoj de Interreto plendas:

«Mi volas "vojaĝi" en Interreto ne pli ol unu horon tage, tamen, ve, ofte 2-3 horojn... mi tre lac'igas, sed ne povas ĉes'igi la "vag'adon"³.»

Ho ve, ankaŭ mi spertis tiun "mal-sanon". Sed ofte mi longe sidis eble pro tio, ke la komput'ila linio ne estas tre rapida, eble pro tio, ke la uz'ado estas sen-paga.

Venis al mi ideo helpi iom al tiuj, kiuj jen ne povas tre longe sidi antaŭ ekrano⁴, jen ne scias, kie trovi bonan starton⁵ en agrabla kaj alloga "flos'ado" laŭ la sen-lima oceano de Interreto.

Unue, mi trovis liston de pli ol 30 TTT (Tut-Tera Tekst'ajo, angle: World Wide Web) adresoj, en kiuj troviĝas la vorto 'Esperanto'. Dum vizito al ili, mi konstatis, ke nur duono estas vizit'inda, aliaj estas aŭ mal-interesaj, aŭ havas nenian rilaton al Esperanto.

Do, de kie ek-iri, kie komenci? Laŭ mi, estas plej bone de <www.esperanto.net> kie mi tuj trovis la tiel nom'atajn "flavaj paĝoj" —

FLOS'ANTE

laŭ

INTERRETO



<www.esperanto.net/veb/flavaj-pagxo.html> kaj la alian "bluaj paĝoj" — <www.esperanto.net/veb/bluaj-pagxo.html>

kie troviĝas tre multe da informoj por ĉies gusto.

Sekva, tre interesa kaj vizitinda loko estas <www.esperanto.nu>. Estas not'inde, ke estis eble ricevi sen-page nuran esperantan ret'adreson: <vianomo@esperanto.nu>. Ho ve, tiu ĉi servo iĝis tiom populara, ke baldaŭ la zorg'anto Franko LUIN devis anonci: "La servo estas tiel populara, ke momente ne eblas akcepti pli da mendoj..." [;-⁶]. Nu kaj kio? Tamen, venu al esperanto.nu kie vi povas trovi multe da informoj kaj, krome, vi povas aktive⁷ kontribui al tiu loko.

Simile, tre bela kaj inform'riĉa estas <www.esperanto.se>, la paĝo de la sveda Esperanto-movado. Al mi ek-plaĉis la paĝo de virtualaj⁸ rondo, kie vi povas registri vian personan paĝon aŭ TTT-ejon. Tio pli-facil'igas la trovon de tio, kio povas vin interesi. Tre bona ideo, ĉu ne?

Ĉu vi deziras havi belan ludon "Billy"⁹, en kiu kaj la teksto kaj la sonoj estas en Esperanto? Do, venu al <www.esperanto.dk/billy/index_eo.html> kaj ĝuu. Vere, la ludo estas tre interesa, almenaŭ miaj kon'ataj junaj amikoj, eĉ ne-esperantistoj, tre ŝatas ĝin!

Eblus multe rakonti pri "flosado" en Interreto, sed "ŝaŝliko"¹⁰ mem estas pli bon'gusta ol ĝia odoro..." [;-)¹¹].

Agrablan flosadon!

Gennadij BASOV (Siberio)

1. Interreto: nun-tempa tuttera inform'ada servo per kumput'iloj / 2. tre vaste kon'ataj / 3. vagi: pas'adi sen-cele / 4. "okulo" de televid'ilo, monitoro / 5. ek-iro / 6. signo, simbolo de mal-ĝojo / 7. tiel, ke vi mem povas agi, partopreni / 8. ne-realaj, ne-veraj / 9. vidu en Juna Amiko (98/3) / 10. speciala manĝaĵo el rost'itaj viando-pecoj laŭ orienta maniero / 11. signo, simbolo de ĝojo.

SENTENCOJ¹ DE BONIFACO

- KREDU miraklojn², sed ne kalkulu je ili.
- VERO valoras, ke oni dediĉu kelkajn jarojn por ĝin serĉi.
- LA plej malmulte-kosta arm'ilo en la mondo estas la sago³ de Amoro⁴.
- DIETAJ receptoj⁵ por mal-dik'iĝi estas laŭ-modaj, de kiam la spegulo estas invent'ita⁶.

Komenc'igas por vi
INTERNACIA POENTO-KOLEKTA KONKURSO
Legu la paĝojn 16/17.

ROLLUDO: Kion ludi? Instrukcioj por Elma Nikastir

1. saĝaj dir'ajoj de fama homo / 2. nekred'eblajn okaz'ajojn / 3. tre simpla paŝaĵo / 4. diino de amo / 5. detala priskribo de pret'igo de, ekzemple, kuir'ajo.

Proponu ludi kune kartojn. Vi kun-prenis tri pakojn da kartoj: Normalan, pakon por *Feliĉaj familioj* kaj pakon kun besto-grupoj. Vi konas multajn ludojn. Vi instruos la regulojn kaj ankaŭ kalkuladon super dek. (En Esperanto estas facile!) Vi ne ŝatas ludi je milito kaj soldatoj, vi estas pac'ema.

Solve de **TRANSIRO**: Necesas 7 trans-iroj. Vidu la suban bildon. S-ino Maria (M), Beleta (B), Petoletto (P), Nerveto (N)

MBPN	PN	PN	N	N	B	B
↓MB	↑M	↓MP	↑MB	↓MN	↑M	↓MB
	B	B	P	P	PN	MBPN

Ni plen'umas la deziron de multaj leg'antoj. De nun, en ĉiu numero vi trovos kvizon, kiun solv'inte kaj send'inte al la redakcio¹ (Juna Amiko, Hítel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario aŭ rete: <junaamiko@esperanto.nu>) vi partoprenos en konkurso kiu, cetere, ekzistas jam de 9 jaroj.

KONSTANTA KONKURSO POR V^{en}



Reguloj

La konkurso nom'iĝas **INTERNACIA POENTO²-KOLEKTA KONKURSO HONORE AL ISTVÁN SZERDAHELYI** (fond'into de Esperanto-fako en la Buda-peŝta universitato³). En ĝi povas partopreni ĉiuj esperantistoj, tamen ni aparte pri-juĝas la konkurs'antojn laŭ aĝo-grupoj:

ĝis 11-jar'uloj – **1-a kategorio**;

11-17-jaruloj – **2-a kategorio**;

super la 17-a jaro – **3-a kategorio**.

Oni povas konkursi nur **individue⁴** (grupoj rajtas konkursi sub la nomo de iu grup'ano kun noto post la nomo: *gr*).

La konkurso daŭras de marto ĝis decembro (en tiu ĉi jaro de junio ĝis decembro). Unu kvizo konsistas el 10 ĝis 15 task'etoj, per kies sen-eraraj solvoj oni povas akiri po 30 poentojn. La solvoj estu skrib'itaj per plumo aŭ tajp'itaj⁵ en Esperanto sur simpla blanka paper'folio en la formato⁶ de duona tajpo-folio (15x21 cm). La solvojn sendu per simpla poŝto aŭ ret'poŝte al la adreso, don'ita post la kvizo (ĉiun kompilas alia instruisto). La solvoj devas atingi la instruiston ĝis la lim'dato. Sur la solvo-folio troviĝu la leg'ebla nomo, la preciza adreso kaj la kategorio de la konkurs'anto. (Ekz.: *Maria ANTAL*; str. Vas 12, H-8500 PÁPA, Hungario; 1-a kategorio)

La ĝustaj solvoj kaj la nomoj de la plej bonaj konkursantoj ĉiam aperos en la sekva numero de nia revuo kaj jar'fine la plej bonaj estos premiitaj (jar'abono por Juna Amiko, libroj, sen-paga partopreno en junul'ara Esperanto-renkont'iĝo).

Reklamacii⁷ oni povas ĉe la redakcio (vidu la ĉi-supran adreson).

Ni esperas, ke vi provos mezuri vian lingvo-scion.

Ni deziras al vi multajn plen'trafojn. **Ne preter-pasu la okazon!**

1. homoj, kiuj kune faras gazeton / 2. gajn'unuo / 3. supera lernejo / 4. ĉiu aparte / 5. tajpi: maŝin'skribi / 6. mezuro de paperfolio / 7. protesti kontraŭ decido.

- 1 Konstruu frazon per la vortoj: *ĉar, Eva, for-estis, gripo, havis, longe, ŝi* (2 poentoj)
- 2 Korektu la erarojn: *Mi petis ŝi telefonu min, kiam komencos la koncerton en ĉi-vespere.* (3 poentoj)
- 3 Trovu almenaŭ tri sinonimojn (sam- aŭ simil'sencaj vortoj) de *'preĝejo'*. (3 poentoj)
- 4 Per afiksoj¹ formu almenaŭ ses vortojn el *'hav-'*. (3 poentoj)
- 5 La temperaturo de la aero estas sub 0° C. Esprimu tion per unu vorto. (2 poentoj)
- 6 Ced'ante en trajno sid'lokon al maljunul'ino kion vi diras? (2 poentoj)
- 7 ... la 1-a ... junio ... Komisiono pri Konkursoj "Juna Amiko" aperigas la taskojn. Kiuj prepozicioj² mankas? (3 poentoj)
- 8 Konkize difinu, klar'igu la vorton *'lingvo'*. (2 poentoj)
- 9 Kiam kaj kie aperis la unua gazeto en Esperanto? Kiu redaktis ĝin? (3 poentoj)
- 10 Uzante partizan formon konciz'igu la frazon: *Kiam Johano en-lit'igos, li baldaŭ ek-dormos.* (2 poentoj)
- 11 De kie venas la arabaj ciferoj? (2 poentoj)
- 12 Solvu la enigmojn³: $iv / ŝe\dot{e}l\ i\dot{g}i / \frac{1}{u}$ (3 poentoj)

La solvojn sendu al: *Geza Kurucz. Hítel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario*
Ret!adreso: <kg@esperanto.nu>

1. vort'far'iloj kiel *ge-, bo-, -ist, -eg ... / sur, en, al, pri ... /* 2. mal-facile solv'eblajn taskojn.

ROLLUDO:

Kion ludi? Instrukcioj por Amal Figur


Vi proponas ludi kune per pupoj. Vi kun-portis dek pupojn: bestajn, knabajn, knabinajn. En la ĉambro estas luddomo kun mebl'etoj. Vi havas ankaŭ du soldato-pupojn. Ĉe komputilo povas ludi nur du personoj, per pupoj ĉiu povas ludi sam'tempe. Vi ne scias la regulojn de kart'ludoj kaj ne povas bone kalkuli super dek.

**Internacia
Infana
Kongreseto
en Berlino,
Germanio
de la 31-a de julio
ĝis la 7-a de
aŭgusto.
Grellstr. 36,
D-10409 Berlin**

BATALO en la BLANKA VALO

Laŭ
"Rumanaj
popolaj legendoj"

Eugenia-Ekaterina
POPOVICIU



O ni diras, ke Sankta Stefano la Granda, reĝo de Moldavio, estis venk'ita de turkoj en la loko nom'ata *Valea Albă* (Blanka Valo). Ĉar la kapo ne plu helpis al li, kion fari, por defendi la landon kontraŭ la mal-amiko, li vizitis ermiton¹ por peti ties konsilon. – Kie estas la turkoj? – demandis la ermito.

– En valo ĉirkaŭ'ita de mont'etoj – estis la respondo.

– Ar'igu rapide mil ŝafojn, mil ŝafidojn, alian milon da bov'inoj kaj tiom saman da bov'idoj. Poste, aranĝu ĉiun grupon sur aparta monteto, sed tiel ke la ŝafoj trov-igu vid-al-vide al la ŝafidoj, kaj la bovinoj vid-al-vide al la bovidoj. Al-donu al ĉiu best'aro malgrandan taĉmenton² da batalantoj. Kiam ĉio estos preta, vi sur-grimpu la plej altan mont-

eton kaj ordonu trumpeti³ kaj ekpafi per kanonoj⁴. Poste, faru kiel Dio helpos vin.

Stefano agis laŭ la konsilo de la ermito kaj kiam la trumpetoj ek-sonis kaj la kanonoj ek-tondris, la bestoj komencis bleki⁵ kaj muĝi⁶ kaj kuri, la ŝafidoj al la ŝafoj, la bovidoj al la bovinoj. Ŝajnis, ke venis la fino de la mondo.

V'id'ante tion la turkoj forte tim'igis sen scii, kien iri kaj kion fari. Kaj kiam ili vidis la al-proksim'ig'antajn batalantojn, ili terure konfuz'igis⁷.

La turkoj, terur'itaj, provis sin savi kur'ante, sed Stefano kune kun siaj batalantoj, kiel tondro, ĵetis sin sur la turkojn, kiuj provis for-kuri trans Danubon.

Tiel la reĝo Stefano ankaŭ ĉi-foje fariĝis venk'into.

PANIKO¹ PRO RADIO-DRAMO²

La 30-an de oktobro 1938 estis prezent'ita, tre ver'sajne, la plej grand'efika radiodramo de la mondo. En tiu tago **Orson WELLES** [ŭelz] (1915-1985, mir'infano de Usono, la reĝisoro³ de pluraj usonaj filmoj kiel "Civitano Kane [kein]", "Sinjorino el Shanghai [ŝanhaj]", "La alia flanko de la vento" kaj aliaj) kun sia teatra trupo⁴ prezentis en **Nov-jorko** la adapt'itan⁵ scienc'fikcian romanon "Milito de mondoj" de **H. G. WELLS** [ŭels] sub titolo "Invado⁶ el Marso⁷"



Orson WELLES kiel 16-jara knabo

Pli ol unu miliono da aŭskultantoj panikis, opini'ante la elsend'ajon vera real'ajo pro real'ismaj efektoj⁸, ne kutimaj antaŭ tiu tempo. La sukces'ego de la radiodramo igis la nomon de **Orson WELLES** vaste populara⁹ en Usono kaj mal-fermis por li liberan vojon al real'ig'ado de el-staraj film'verkoj. (Laŭ Zoltan Kurucz)

1. tim'ego, kiu sam'tempe ek-regas multajn homojn / 2. verko por teatro, televido aŭ radio / 3. estro ĉe real'ig'ado de film-verko / 4. la tuto de teatraj artistoj / 5. ali'form'itan laŭ la bezonoj (ĉi tie por radiofonio) / 6. gran-da atako kontraŭ lando, regiono / 7. la nomo de ĉiel'korpo / 8. rimedoj, kiuj igas la efikon pli granda / 9. vaste kon'ata de la publiko.

**Ne forgesu
pri la solvoj de nia kvizo!
La solvojn vi povas sendi ankaŭ retroŝte.
La solvoj atingu la adres'aton
ĝis la lim'dato.**

1. homon, kiu mem-vole vivas izol'ita / 2. ne-grandan grupon de soldatoj / 3. trumpeto: milita blov'muzik'ilo / 4. paŭl'egoj / 5. el-igi besto-krion / 6. voĉi kiel bovoj, ŝafoj / 7. fariĝis tute ne-certaj kion fari / 8. fabel'ecaj rakontoj pri el-staraj historiaj personoj.

Pri la ĉina skribo-sistemo

La ideogramoj¹

Por multaj homoj la ĉinaj bildo-signoj estas mir'indaj kaj tre misteraj². Eble, vi scias, ke multaj el tiuj signoj aspektas kiel la objektoj, kiujn ili reprezentas³. Tiajn signojn oni nomas **piktogramoj**.

Antikve ⁴	Nun	Signifo	Antikve	Nun	Signifo
☉	日	<i>suno</i>	火	火	<i>fajro</i>
☾	月	<i>luno</i>	水	水	<i>akvo</i>
山	山	<i>monto</i>	羊	羊	<i>ŝafo</i>
人	人	<i>homo</i>	木	木	<i>ligno</i>

Tabelo 1. Simplaj klasikaj⁵ piktogramoj

Jen vi vidas, kiel la pra-ĉinoj kreis la signojn desegn'ante. Kun iom da imagi-povo, vi ankaŭ komprenos kiel kre'ive oni elpensis pli kaj pli da signoj. Ĉiu signo reprezentas iun ideon. Tial, la ĉinajn bildosignojn la lingv'istoj nomas **ideogramoj**.

Antikve	Nun	Signifo	Antikve	Nun	Signifo
大	大	<i>granda</i>	林	林	<i>arbaro</i>
小	小	<i>malgranda</i>	森	森	<i>ĝangalo</i>
上	上	<i>supra</i>	焱	焱	<i>varmega</i>
下	下	<i>malsupra</i>	明	明	<i>brila</i>

Tabelo 2. Ekzemploj de ideogramoj. Ĉu vi sukcese deĉifris⁶ ilin?

Tamen, ekzistas ankaŭ ideoj, kiuj estas malfacile bild'ig'eblaj ĉar abstraktaj⁷, kiel ekzemple "varmega" aŭ "brila". Vidu, kiel aspektas la signoj por "bona", "penso" kaj "flui":

Antikve	Nun	Signifo	Klar'igo
好	好	<i>bona</i>	havi kaj fil'inon (女) kaj filon (子)
想	想	<i>penso</i>	oni uzas la koron (心) por pensi
流	流	<i>flui</i>	akvo fluas

Tabelo 3. Ideogramoj de pli abstraktaj ideoj konsistas el diversaj partoj.

Eble vi ek-dubas, ĉu vere ĉiaj ideoj estas bildigeblaj? Ĉu ĉiuj ideoj havas sian propran ideogramon? Kiel la ĉinoj kreis dek-milojn da signoj kaj uzas ilin?

Prezentu al vi, ke vi estas juna lernanto en iu urbo de Ĉinio. Vi bezonas almenaŭ 6000 signojn por la plej ordinara ĉiu-taga vivo.

Se ne, vi ne komprenos, kion oni skribas en la ĵurnaloj, nek la leterojn de viaj ge-amikoj, nek eĉ la komik'ajojn! Se via stud'fako estas la ĉina lingvo, vi, eble, devas koni ĝis 9000 signojn. Se vi studas ĉinajn historion kaj klasikan literaturon, vi nepre lernos krom la nun-tempajn signojn, ankaŭ la mal-novajn signojn, kiujn oni ne plu uzas. Tio signifas, eble, ĝis 20.000 signojn!

La logiko⁸ de ideogramoj

Kiel oni en-kap'igas tiom da signoj? En la antikva tempo, pro la malfacil'eco de la skribo-sistemo, skribo-kapablo signifis altan kler'econ. Por havi bonan oficon en la imperia⁹ regist'aro oni devis bone koni la verk'ajojn de *KONFUCIO* kaj aliajn klasikajn verkajojn. Tiu-cele, la gepatroj deziris, ke la gefiloj bone regu la ideogramojn. La rigora¹⁰ eduk'sistemo, eĉ ideogram'ludoj kaj enigmoj restas ĝis hodiaŭ. Infanoj ek-de infan'ĝardeno diligente praktikas la skrib'adon, inter-alie, siajn ĉinajn nomojn.

La plej-multo de la ideogramoj konsistas el pluraj partoj, kiel vi jam vidis. Multaj ideogramoj havas similajn aŭ samajn erojn. La ideogramoj de ĉiuj fiŝoj, ekzemple, havas la "fiŝan" eron aŭ radikon (魚), kaj metaloj diversspecaj havas la "or'radikon" (金). Per tio grave facil'iĝas la memor'ado de tiom multaj ideogramoj.

金	oro	鐵	fero
銀	arĝento	鎂	magnezio
銅	kupro	錢	mono

Tabelo 4. Ideogramoj kun "kategoria radiko"

La "Esperanto" de Oriento

Ĉinio estas tre vasta lando. Sia-tempe Ĉinio estis la plej influhava¹¹ lando de la antikva Orienta Azio. Multaj ali'land'anoj venis al Ĉinio por studi kaj kler'iĝi. Stud'inte en Ĉinio, la alilandaj kler'uloj portis kun si la ĉinajn klasikajn verkajojn, la filozofion, la kulturon kaj, interalie, la ideogramojn.

Ĝis hodiaŭ japanoj kaj koreoj ankoraŭ uzas ideogramojn* en siaj lingvoj. Kvankam la hodiaŭaj koreoj kaj japanoj parolas la korean kaj la japanan, kiuj ne rilatas al la ĉina lingvo (krom la komuna uzo de ideogram'aro!), la koreoj kaj japanoj pruntas multajn vortojn el la ĉina lingvo. La ideogramoj, ja, estas grava parto de la

orient'aziaj kulturoj.

Eĉ en Ĉinio ekzistas multaj dialektoj reciproke ne-inter-kompren'eblaj. La Kantona parol'anto povas tute ne kompreni la Ŝanhajan, same kiel la Korean aŭ Japanan! Sed dank' al la komunaj ideogramoj, ĉinoj kaj aliaj uz'antoj de la ideogramoj povas iom kompreni sin skribe. Se mi vidis, ekzemple, fajron, kiel mi kompren'igus min al homo, kiu parolas alian lingvon? Nu, se li uzas ideogramon, li komprenos, kiam mi skribas “火”, malgraŭ ke ni el-parolas “fajron” mal-same, ĉiu en sia dialekto aŭ lingvo.

En multaj Aziaj landoj, kiam mi diras la vorton “Esperanto”, eble mal-multaj konas ĝin. Sed se mi skribas “世界語”, ĉiuj scias, ke temas pri “lingvo de la mondo”. La ideogramo ja estas “Esperanto” de Oriento.

Bill MAK, Honkongo

* La koreoj kaj japanoj havas siajn proprajn alfabetojn (Hangŭl/Hiragana, Katakana). Sed por literaturo kaj verk'ado kun ĉinaj vortoj, oni ofte uzas ideogramojn, kiujn oni konas kiel *Hanĉa* en la korea lingvo kaj *Kanĝi* en la japana lingvo.



Ekzemplo de ĉina kaligrafio¹² far'ita de Majstro *Go Ŭen-ĝaŭ*. Kaligrafio estas nepra parto de la edukado de ĉiuj kleruloj. Kaligrafio estas la plej centra kampo de la ĉina kultura vivo. Notu, ke oni skribas de dekstre mal-dekstre.

1. skribo-signoj por vortoj / 2. sekreto-plenaj / 3. prezentas sin kiel komisiito de io aŭ iu(j) / 4. en praa tempo / 5. ne nun-tempaj kaj konsider'ataj kiel modeloj / 6. venis al solvo de enigma tasko, sekreta skribo / 7. ne-sent'eblaj per sens'organoj (oreloj, okuloj, nazo k.a.) / 8. scienco pri racia inter-de-pendo de pens'eroj / 9. imperio: grandega plur'etna ŝtato / 10. tre severa / 11. influj: efiki sur ion, iun / 12. arto de bel'skrib'ado.

Kiuj estis la ciferoj?

$$\begin{array}{r} \square\square \cdot \square\square \\ \square\square \\ \hline \square\square\square\square + \\ \hline 9\square\square\square \end{array}$$

La apuda ilustraĵo prezentas multiplikon¹, kies ciferoj estas for-viŝ'itaj. Logike² el-pensu tiajn ciferojn.

Sendu la solvon al la redakcio ĝis la 1-a de aŭgusto.


TRANS-IRO

Sinjorino Maria tendumis³ kun siaj tri gefiloj: la filino Beleta kaj la filoj Petoletto kaj Nerveto. Dum-voje ili devis transiri riveron per boat'eto⁴ por ne pli ol du personoj.

Neniu el la infanoj povas transiri la riveron sen la patrino kiu, sia-vice, ne deziras la kun-eston de Beleta

kune kun Petoletto aŭ Nerveto, ĉar ili kaj ŝi inter-batalas. Kiel s-ino Maria faris la transiron? Kiom da transiroj estis bezon'ataj?

Solve sur paĝo 15.



1. obliĝo / 2. laŭ la leĝoj de la pens'ado / 3. ripozis loĝ'ante en kun- kaj dis-met'ebila domo el teks'aĵo / 4. mal-granda akvo-vetur'ilo el ligno.

ROLLUDO:

Klon ludi? Instrukcioj por Mirjam Usuze

Proponu ludi per komputilo. En la ludoĉambro estas via komputilo. Vi scias uzi ĝin. En ĝi estas pluraj bonaj ludoj. Vi havas kvizo-ludon, kastelan serĉo-ludon, aŭto-konkursan, ski'konkursan, futbalan ludojn kaj batalo-ludon en la komputilo. Ĝi havas ankaŭ kart'ludojn, por kiuj oni ne bezonas veraĵn kartojn.

8	1	6
3	5	7
4	9	2

Jen apude vi trovas unu el la ĝustaj solvoj de *Magia Kvadrato*, kiu aperis en decembro (4/98).

Ĝustajn solvojn sendis al ni:

J.Paulik (Brazilo), Marija Mitevaska (Makedonio), Abatevi Aba Eklu (Togo), Irina Nagy (Rumanio), Victoria Mihók-Géczi (Rumanio).


La redakcio kore gratulas kaj sendas premie la jubilean ekzemplaron de *Juna Amiko*.

Praktiku Esperanton kun viaj gelernantoj ankaŭ sur faka tereno, eble fremda al vi. Vi baldaŭ konstatos, ke la fremdlingva komunikemo de la grupanoj salte plialtiĝos.

Ni elektu eksperimenton, kiu pruvu iun fizikan aŭ kemian leĝon. El pedagogia vidpunkto ni decidu, ke la eksperimenton faru kaj fremdlingve klarigu du aŭ tri lernantoj antaŭ la grupo.

Kion ni devas prepari, disponigi, liveri, por ke la instrufazo sukcesu?

1. *Detala fremdlingva priskribo (konforma al la aĝo) de la eksperimento por la demonstrantoj (praktiko);*
2. *klarigo de la procedoj (teorio);*



3. *atentigo pri fakvortoj (kun etnolingvaj ekvivalentoj);*
4. *enmanigo de materialoj bezonataj por la eksperimentoj;*
5. *metodikaj konsiloj (inkluzive de elekto de utiligendaj lingvaĵoj).*

Unua eksperimento

- a) Metu maldikan laton, eble eluzitan liniilon, sur la tablon tiel, ke ĝi elstaru kelkajn centimetrojn de la tablorando.
- b) Per mano forte batu la elstarantan finon de la lato.

Kio okazas? Granda parto de la lato, kuŝanta sur la tablo, eksaltas alten kaj la tuta lato kapriolas, kirliĝas en la aero. (Via mano certe ne doloras.)

Dua eksperimento

- a) La fino de la sama lato ĉi-foje kuŝu ekzakte je unu tablorando.
 - b) Havigu al vi du gazetojn prefere novajn, neniom ĉifitajn aŭ alimaniere difektitajn kaj sterninte ilin sur la laton zorge glatigu la gazetojn.
 - c) Malrapide eltiru la latofinon kelkajn centimetrojn trans la randon.
 - d) Per mano subite fortege batu la elstarantan latoparton.
- Kio okazas? Se ĉiuj ordonoj estis bone plenumitaj, la lato apenaŭ reagas, restas preskaŭ senmova. En ekstrema kazo ĝi eĉ disrompiĝas. (Nur via mano, povas esti, iomete suferis, sed tio ja certe ne gravas!)

Fakesprimolj:

Atmosfera premo, aeropremo, vakuo, maldensigita aero.

Metodikaj konsiloj:

1. Unu demonstru, alia klarigu kaj provoku diskutadon per pensigaj demandoj. Uzu verbojn kiel *diveni, konjekti, supozi, opini, konkludi, imagi, hipotezi, argumenti, aprobi, kredi, konvinki, dubi, samopini, oponi, kontraŭi.*
2. Fine, petu la ĉeestantojn rakonti pri propraj observoj rilate al simile "ŝokaj" fizikaj fenomenoj. Se neniu reagas, atentigu pri aviadiloj kaj helikopteroj. Eble, unu el la ĉeestantoj kunigos vian eksperimenton kun la flugkapablo de tia specia maŝinoj.

Dank' al Dio estas vespero

En tradicia afrika socio, gepatroj estas ne nur proviz'antoj de la familio. Ili estas ankaŭ amuzantoj de la infanoj. En vilaĝoj, kie ne troviĝas amuz'iloj, kiel televido kaj radio, estas la gepatroj, kiuj amuzas la infanojn kaj instruas ilin kanti. Tia-maniere ekde infan'aĝo afrik'anoj lernas kanti kaj kreskas por fariĝi muzik'istoj.



Labor'ante tutan tagon, la familio povas amuz'iĝi nokte. Do, post vesper'manĝo la infanoj ĉiam ĝojas, ke estas tempo aŭskulti interesajn fabelojn kaj ŝercojn de paĉjo kaj panjo. La infanoj sprite diras: “Dank' al Dio estas vespero”.

La infanoj sid'iĝas ĉirkaŭ la gepatroj por aŭskulti interes'ajojn. La rakontoj estas tiel amuzaj, ke la infanoj multe rid'egas. Ili tiom ridegas, ke iuj el ili furzas. Sed ili ne nur aŭskultas folklor'ajojn. Ili ankaŭ kantas kaj aplaudas. Cetere, ili metas demandojn kaj respondas enigmojn de la gepatroj. La infanoj, kiuj ĝuste respondas enigmojn, ricevas donac'etojn de la panjo.

Peter OPA, Niĝerio

ROLLUDO: Kion ludi? Instrukcioj por Elma Nikastir

Proponu ludi kune kartojn. Vi kun-prenis tri pakojn da kartoj: Normalan, pakon por *Feliĉaj familioj* kaj pakon kun besto-grupoj. Vi konas multajn ludojn. Vi instruos la regulojn kaj ankaŭ kalkul'adon super dek. (Kalkuli en Esperanto estas facile!) Vi ne ŝatas ludi je milito kaj soldatoj, vi estas pac'ema.

- Se vi havas al-iron al Interreto, vizitu TTT-ejon <http://esperanto.nu> kaj klaku sur *La angulo*. Tie vi trovas plurajn, kiuj serĉas korespond'amikojn.

- Geknaboj 9-12-jaraj korespondus. *S-ino Tan Xia yi*, Hua-qiao Xiao-xue, Zhongshan ba Lu 2 Hao, CN-510175 Guangzhou, Ĉinio.

- Ok 9-17-jaraj malagasaj geknaboj serĉas leter'amikojn. Skribu al *Heriniaina Olivia Razafiarisolo*, Lot II-C 72 FD Manjakaray, 101 Antananarivo, Malagasio.

- Pli ol dudek 16-19-jaraj mez'lernej'anoj deziras koreskondi kun ĉiuj landoj individue aŭ grupe. Leterojn adresu al ilia instruistino: *Elzbieta Biskup*, ul. Wojnara 1,



PL-43-316 Bielsko-Biała, Pollando.

- Kvin brazilaj 11-14-jaraj geknaboj volas korespondi kun eksterland'anoj. Turnu vin al *Cristiane Pereira de Alveira*, SQN-305 Bloco C - apt. 114 - Brasília - D.F, Brazilo.

- Kvar 13-16-jaraj knabinoj serĉas korespond'amikojn el la tuta mondo. Komuna adreso: *Esperanto-Klubo de L.L.Zamenhof*, abonkesto 306, UA-343871 Avdejevka-3, Donecka regiono, Ukrainio.

juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj
26-a jaro, n-ro 2 (89), 1999
Aperas 4 fojojn jare.

Redaktoro: *Géza KURUCZ* (Hítel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)
Ret'adreso: junaamiko@esperanto.nu
Vicedaktoro: *Stefan MacGill* (Hungario)

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario
Eldonanto: ILEI, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby, Svedio
Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *Lisbet kaj Bertil Andreasson* (Svedio), *s-ino Raita Pyhälä* (Finnlando), *s-ino Monique Noël* (Francio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Gennadij Basov* (Rusio), *Brandhyt Mezini* (Albanio), *Till Dahlenburg* (Germanio), *Rinzo Okumura* (Japanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Zoltán Kurucz* (Hungario), *Dieter Berndt* (Germanio), *Bill Mak* (Ĉinio); *Michel Nkwiri-kiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah A. Attiogbe-Agbemadon* (Togo), *José J. Campos Pacheco* (Kubo)

Irina Nagy (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio) grafikisto
Farita en Presejo Saluton
Chinois u. 20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1314

Societa ludo: ŜERCOJ (p.28)

Per la ludo, dank' al amuzaj ludo-punoj oni pli-grand'igas sian vort'provizon¹.

Estas bezon'ataj:

ludo-tabulo (vidu la paĝon 28), ĵet'kubo, lud'markoj kaj kart'aro (kun la ludopunoj).

Prepar'ado de la bezonat'ajoj

Ludotabulo. Per foto-kopilo² laŭ-bezone grand'igu la bildon (paĝo 28).

Kartaro. El-tondu kartojn (ekzemple 7 x 5 cm) el mal-dika kartono³ kaj sur ĉiu karto skribu ludopunon.

Regul'aro

Sin-sekve ĉiu lud'anto ĵetas la kubon kaj antaŭen-iras sur la ludotabul-eto laŭ la punktoj de la ĵetkubo. Kies ludmarko trov'igos sur kolor'ig'ita ĉelo⁴, tiu ricevos ludopunon. En tiu ĉi okazo la antaŭa ludanto prenos karton kaj laŭt-legos la punon. Venkos tiu, kiu ekzakte⁵ atingos la stelon. (Se estus tro da poentoj, la ludanto devus retro-ni laŭ la troaj poentoj.)

Listo de eblaj punoj:

1. Movu la nazon kiel kuniklo⁶. / 2. Boju⁷. / 3. Salt'adu per unu piedo ĝis venos denove via vico. / 4. Kisu la manon de via plej proksima najbar'ino. / 5. El-ŝovu la langon al iu. / 6. Zumu⁸ kiel muŝo. / 7. Riverencu⁹. / 8. Bov'ine bleku. / 9. Miaŭu¹⁰. / 10. Zumu kanton. / 11. Oscedu¹¹. / 12. Tiklu¹² vian najbar(in)on. / 13. Kapre bleku. / 14. Mim'ado¹³; ŝminku¹⁴ vin. / 15. Kisu vian piedon. / 16. Mimado: vi estas kant'ist(in)o... / 17. Mimado: vi estas ŝnur'danc'ist(in)o... / 18. Mimado: vi estas porko... / 19. Mimado: vi manĝas spagetojn¹⁵. / 20. Mimado: vi estas bebo¹⁶... / 21. Jonglu¹⁷ (aŭ ŝajn'igu!) per pilkoj. / 22. Mimado: pafu al cel'tabulo (per revolvero aŭ arko laŭ-plaĉe). / 23. Mimado: vi estas fiŝo... / 24. Mimado: vi estas simio¹⁸... / 25. Mimado: vi dormas kaj ronkas¹⁹... / 26. Mimado: la unuan fojon vi iras per rul'suoj... / 27. Mimado: sur-faden'igu kudr'ilon. / 28. Mimado: vi volas vin bani en la maro, sed la akvo ŝajnas tro mal-varma... / 29. Mimado: nutru bebon per suĉ'botelo²⁰. / 30. Mimado: biciklu. / 31. Mimado: vi suĉas glaci'ajon... / 32. Mimado: vi flaras²¹ pipron²² (ne forgesu terni²³)... k.t.p.


Alia ebla regulo

La ludanto silente legas sian punon, faras ĝin kaj la aliaj devas diveni pri kio temas.

1. amaso da vortoj, kiujn vi uzas kaj komprenas / 2. kopii: fari alian, perfekte saman pecon / 3. dika papero / 4. ĉi tie: numer'ita loko sur la ludotabulo / 5. sen rest'ajo; esti nek pli nek malpli / 6. hejm'ig'ita leporo / 7. hunde bleku / 8. el-igi kontinuan bruon kiel muŝo, abelo / 9. salutu iun per ĝentila mov(ar)o / 10. kate bleku / 11. longe el-spiru kun larĝe mal-ferm'ita buŝo; signo de dorm'emo / 12. fingre tuŝu iun en sent'iva loko por rid'igi / 13. imit'ado per movoj sen vortoj / 14. pli-bell'igu vin per kremoj kaj kolor'ig'iloj... / 15. longajn mallarĝajn farun'ajojn / 16. suĉ'infano / 17. lerte manovru per kugloj, pilkoj, konstante ĵet'ante kaj kap'ante / 18. hom'simila besto / 19. dorm'ante el-igas laŭtajn sonojn / 20. suĉi: el-igi per fortaj tir'spiroj / 21. sentas per nazo / 22. tre akra-odoran spicon / 23. subite el-puŝi aeron tra buŝo kaj nazo, ordinare kun bruoj.

SOCIETA

LUDO



Reguloj sur p. 27